FEDERACION · ESPERANTISTA · ESPAÑOLA · H E F

Año V (N.° 60)

Núm. 12

BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

DICIEMBRE 1953

RUZAFA, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

BONAN KRISTNASKON!
MULTE DA PROSPERO EN LA NOVA JARO 1954!

EL DOCTOR ZAMENHOF, BIENHECHOR DE LA HUMANIDAD

La historia de la civilización es una incesante pugna entre la pesadumbre de la ignorancia y el anhelo escrutador del progreso. La ley del péndulo fué defendida por Galileo, contra la opinión de la totalidad de los representantes de la ciencia coetánea. Pasteur tuvo que arrostrar la oposición y las burlas de la Academia. La idea de un idioma internacional, para solventar el caos lingüístico, ha obsesionado, durante siglos y siglos, a filósofos y pedagogos, sin que ninguno, antes de Zamenhof, llegase a un resultado satisfactorio. Sin embargo, todos aportaron su grano de arena y contribuyeron, con ideas y hechos, a la concepción que había de triunfar con Zamenhof.

Si grande fué la realización de su obra, también lo fué el mérito de su visión de conjunto del problema, así como su plan para la realización, difusión y conservación del idioma. Supo lograr y administrar su triunfo. Y si el camino de su vida estuvo sembrado de abrojos, también recibió destacados honores que aceptó, modestamente, sin vanidad alguna, como homenaje a su buena voluntad y no a su portentoso talento.

En la dispensa de esos laureles, España no anduvo remisa. Hoy nos complacemos en reproducir la figura del Maestro, ostentando el Gran Collar de la Orden de Isabel la Católica, que le concedió el Gobierno español, como reconocimiento a sus méritos y a su inconmensurable bondad. Nosotros, los esperantistas españoles, con motivo del 94° aniversario de su nacimiento, al honrar su memoria, no podemos silenciar la deuda de gratitud que la humanidad debe a todos los que se esforzaron en lograr, aún sin conseguirlo, lo que cumplidamente alcanzó Zamenhof creando el Esperanto, luz que ilumina el sendero de la mutua comprensión y que, en un futuro próximo, será potente faro que guiará con sus destellos la marcha ascendente de la civilización y del progreso.

Mientras tanto, sigamos demostrando a la gente, con nuestros afanes y desvelos, con la realidad de nuestra presencia, la razón de nuestro esperanzado postulado:

¡CADA PUEBLO CON SU PROPIO IDIOMA Y EL ESPERANTO PARA TODOS!



7.° Congreso Universal de Esperanto en Amberes (Agosto de 1911)

El Dr Zamenhof ostentando el Gran Collar de la Orden de Isabel la Católica, después de serle impuesto, en nombre del Gobierno español, por el entonces Capitán de Artillería, hoy General de la Reserva, D. José Perogordo Camacho

◆ LINGVA KONKURSO: LERNU TRADUKANTE! ◆

Kelkaj konkursantoj scivolas, ĉu konvenas traduki la vortojn aŭ la spiriton de la tekstoj. Ni sciigas ilin, ke, kvankam tiun demandon devas respondi pli kompetentaj esperantistoj, niaopinie, estas preferinde interpreti laŭeble la intiman signifon de la ideo, tradukante per rekta stilo. Multfoje, la verkistoj uzas la vortojn laŭ la figura senco; sed, kiam oni transigas tiajn esprimmanierojn en Esperanton, estas konsilinde precizigi la signifon, donante al la vortoj la ĝustan esprimon, ĉar aliel la metaforoj kaj sinonimoj restas plejofte nekompreneblaj por internacia publiko. Pro tio, samkiel la klasikaj aŭtoroj bezonas komentariojn, la laŭliteraj tradukoj bezonas klarigojn. En niaj antaŭaj *Taskoj,* ni intencis fari rimarkojn al la dusencaj kaj eĉ, kelkfoje, dubsencaj vortoj; sed, ni pensis, ke tio okupas multe da tempo kaj spaco. Eksterordinare, do, ni prezentas hodiaŭ al niaj legantoj, kiel ekzemplon, la senmetaforan tradukon de la Tasko num. 8, faritan de ni mem, do, sen premio, kun aldono de klarigoj al kelkaj vortoj, ĉar al ĉiuj ne eblas ĉi tie, rememorigante niajn amikojn, tamen, ke, ekzemplo proponas, sed ĝi ne ordonas:

«*La homoj de la Nordo, kiuj bezonas la bruston arda kaj la trinkaĵon alkohola, por defendi sian vivon kontraŭ la makzeloj de la frosto, pensadis ĉiuhore pri la mediteraneaj riverbordoj. Ĉiuj iliaj movoj, foje militaj, foje pacaj, celadis malsupreniri de la randoj de la glaciaj maroj, ĝis la strandoj de la varmeta maro. Ili avidis la posedon de la kampoj. kie la respekteginda olivarbo alternigas sian severan maljunecon kun la gaja vinberujo; kie la pino etendas sian kupolon kaj la cipreso starigas sian minareton. Ili volis revadi sub la parfuma blankaĵo de la senfinaj oranĝarbaroj; esti mastroj de la ŝirmataj valoj, kie la mirto kaj la jasmeno aromigas la salan aeron; de la estingiĝintaj vulkanoj, kiuj lasas elkreski inter siaj rokoj la aloon kaj la kakton; de la marmoraj montoj, kiuj malsuprenirigas siajn blankajn akraĵojn ĝis la fundo de la maro*».

SAGRADO estas sinonima adjektivo, kiun oni povas egale traduki per *sanktega* aŭ *respekteginda;* sed, ĉar la aŭtoro parolas pri la severa maljuneco de la olivarbo, konvenas traduki ĝin per *respekteginda.* NIEVE tute sen ia dubo estas neĝo; tamen, en ĉi tiu okazo, ĝi estas metaforo, aŭ ĉirkaŭfrazo, ĉar la novelisto ne rilatas la neĝon, kiu certe, ne konvenas al la delikataj oranĝarboj. Li aludas al ĝia blanka koloro. Ĉi tiuj arboj dum la florado naskas blankajn floretojn, kiuj similas neĝajn floketojn; kaj, pro tio, ili aperas kvazaŭ vestitaj en blankaĵo. MUDOS laŭlitere estas *mutaj;* kaj, kvankam, efektive, la vulkanoj de la rakonto ne plu posedas sian esprimkapablon: la erupciojn, oni devas supozi, ke tio okazas, ĉar ili estas estingiĝintaj. ARISTAS havas tri sencojn: *aristoj, eĝoj* kaj *akraĵoj.* La unua koncernas la fiŝojn; la dua, geometrian figuron, ĉefe; kaj la lasta karakterizas la tranĉajn randojn, la akraĵojn. Sed, sperto estas averto; kaj, bedaŭrinde, ni spertis la fakton, post unujara gvidado de ĉi tiu lingva fako, ke, simile al sonoriloj, kiuj vokas al preĝejo, kaj mem neniam eniras, la legantoj de nia Bulteno interesiĝas pri ĉi tiu sekcio, ĉar ili montris al ĝi sian simpation en multaj leteroj, sed ili ne inklinas partopreni la lingvajn konkursetojn, kiujn ni malfermis, ne nur por porfektigi la lernantojn per tradukaj ekzercoj, sed ankaŭ kun la celo pliperfektigi la progresantojn de nia lingvo.

Nia entrepreno ne plene sukcesis. Niaj klopodoj kaj admonoj estis vanaj! Ni ja ricevis, mezkvante, por ĉiu fojo, 30 kontribuaĵojn, el kiuj nur 20 proksimume meritis konkuri. Cetere, preskaŭ ĉiam, ili estis de la samaj samideanoj, el kio ni deduktis, ke oni devas fermi la konkurson, elektante novajn rimedojn. Ni devas ankaŭ deklari, ke ni elektis ĉiam kiel eble plej senpartie la plej bonan tradukon. Tamen, ni evitis samtempe doni la premion al iu antaŭa gajninto, por plimultigi tiamaniere la premiitojn. Sed, kun la tempo, ni konstatis, ke tiu metodo, kvankam bonintenca, ne estas sufiĉe justa, havante eĉ la malavantaĝon, ke post kelkaj pluraj monatoj ni jam ne scius kiun elekti, tial ke ĉiuj bonaj partoprenantoj estus jam laŭreatoj; kaj doni ĉiam la premion al la samaj ankaŭ estas kritikebla.

Pro ĉi tiuj indikitaj motivoj, ni komunikas, kiel jam dirite, la fermon de ĉi tiu rubriko, ĝuste nun, ĉe la fino de la jaro, en kiu ĝi naskiĝis. Inter la planoj de la nova redaktoro, estas tiu aranĝi taŭgan sekcion por helpi tiujn, kiuj deziras perfektigi sian lingvan scion per klarigoj de kompetentuloj. Sed, kore salutante vin, en ĉi tiu adiaŭa paĝo, ni ankoraŭ diras al vi: LERNU TRADUKANTE! — **La gvidinto de la Konkurso, RICARDO QUILES**

 RIGARDANTE AL LA ĈIELO... 

Ĉu estas vivo ĉe aliaj planedoj? Jen tre diskutita kaj ankoraŭ diskutata problemo. Multe da scienculoj rezonas sian nean respondon, dirante, ke kie ne estas aero aŭ atmosfero ne estas eble vivi. Aliaj scienculoj kaj eĉ nesciuloj diras, ke, se vegetaĵoj, bestoj kaj homoj bezonas la lumon kaj la varmon de la suno, estas stulteco la supozo, ke ne estas vivo ĉe Venuso kaj Marso. Mi ne intencas diskuti, nek tio estas eble al mi. Tamen, kelkaj ekzemploj liveras materion al mi, por iomete skribi pri la afero: Mi scias perfekte, ke la homoj ne povas vivi sub akvo kaj ke la fiŝoj, kontraŭe, mortas sur tero. Nu, ĉiu speco de vivantoj bezonas specialajn organojn. Kaj, same kiel la funkcio kreas la organon, tiel la medio kreas aŭ transformas, iom post iom, la vivkondiĉojn. Mi rememoras, ke la afrikaj sovaĝuloj ne kutimis manĝi salon, kaj ke la unuajn fojojn, kiam la sklavigistoj donis ĝin por la aĉetado de sklavoj, multaj nigruloj pereis; sed, pli poste ili alkutimiĝis, kaj nun eĉ ili frandas ĝin. Se oni trinkas venenon, sendube oni mortos; sed komencante laŭ tre etaj kvantoj, iam oni povos uzi ĝin sen danĝero. Ĉu ne estas mikroboj, kiuj vivas sen aero? Jes, la anaerobioj.

Aliflanke, nia mondo bezonas la sunon kaj ĝian varmon; sed, ĉu ne estas bestoj kaj ankaŭ homoj, kiuj nur povas vivi en la plej malvarmaj regionoj, kaj certe ili mortus en tropikaj aŭ ekvatoraj zonoj? Neniam mi kuraĝos diri, ke aliaj planedoj estas neloĝeblaj. Pli saĝe ja estus, anstataŭ fabriki instrumentojn por ruinigi la homaron, oferi la cerbojn kaj la materialojn por atingi efektivan kontakton kun la najbaraj planedoj, kie oni povus ŝajne konstati. ke ni estas simplaj aerobiaj mikroboj, flanke de aliaj estaĵoj, eksterordinare pli bonaj kaj pli inteligentaj ol ni mem, kvankam iliaj korpoj aspektus al nia vido malpli harmoniaj. GLADIO.

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

- JAPON.—El Vicepresidente de la sección de Actividades Culturales de UNESCO, profesor Frem Nath Kirpal, de la India, ha mantenido una conferencia con los rectores de la Federación de Asociaciones Colaboradoras de UNESCO, del Japón. En esta entrevista se habló de las posibilidades inmediatas del Esperanto como idioma de nexo común en las relaciones internacionales. Durante el 40º Congreso Japonés de Esperanto, celebrado en Okayama, del 19 al 21 de Septiembre, se utilizó un matasellos especial conmemorativo, para el franqueo de la correspondencia depositada durante los días del Congreso.
- ARGENTINA. — En la ciudad General Alvear (Mendoza), se ha rotulado una calle con el nombre de «Doctor Zamenhof». En el Colegio y Seminario Salesiano, de Bernal, han empezado cursos de Esperanto, después de haberse constituído un Grupo filial de la Asociación Esperantista Católica Argentina, cuya dirección reside en Buenos Aires.
- ESTADOS UNIDOS.—«American Journal of Physics» ha publicado recientemente un artículo del profesor F. J. Belinfante, de la Universidad Purdue (West Lafayette Indiana), con el título «An International Language for Science», recomendando el uso del Esperanto en el intercambio cultural, entre universitarios de distintos países.

XV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

24 - 25 - 26 - 27 Julio 1954 en ZARAGOZA

Después de un cuidadoso estudio, han sido fijadas las fechas de nuestra gran Asamblea. Se ha tenido muy en cuenta la conveniencia general, para facilitar la asistencia del mayor número posible de congresistas. Desde ahora, todo esperantista español debe preparar ya sus vacaciones estivales para los días anunciados. En las poblaciones donde exista un grupo organizado, sería conveniente preparar viajes colectivos, constituyéndose fondos de ahorro para que la posibilidad de desplazarse a Zaragoza alcance hasta a los amigos más modestos económicamente. En Bilbao ya se trabaja en este senttdo. Téngase en cuenta que el próximo Congreso será de gran transcendencia para el porvenir del esperantismo español. En el número de Enero publicaremos en detalle el Programa Provisional. Hasta entonces pueden pedirse toda clase de datos y referencias al

Comité Organizador del XV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

Santa Isabel, núm. 16, 1.º — ZARAGOZA

CONSIDERATIO NOMINIS - GRAMATIKAJ DIFINOJ

de J. Régulo Pérez (Kanariaj Insuloj)

La skolastikan aforismon *in principio doctrinae sit consideratio nominis,* kiu en Esperanto sonus proksimume: «Ĉe enkonduko al ia studo, oni zorgu la sencon de ties terminoj», mi rememoris, kiam laste mi legis en nia BOLETIN n.º 7 - 1953, p. 505, respondon de S-ano Molera al demandinto, kiu ne povis klarigi al si la akuzativon post *anstataŭ* en la propozicio: «Mi donis al li kajerojn *anstataŭ librojn*». S-ano Molera diras, ke post la PREPOZICIOJ *anstataŭ* kaj *kvazaŭ* oni povas uzi akuzativon, pro tio, ke ĉe tiuj okazoj *anstataŭ* kaj *kvazaŭ* rolas kiel ADVERBOJ. Nu, laŭ mia kompreno de la lingvo, la rezonado de S-ano Molera ne estas konvinke klara, pro misuzo de la ŝlosilaj vortoj *prepozicio* kaj *adverbo,* kiujn mi substrekis per specialaj literoj.

Sed, antaŭ ol daŭrigi, mi emfaze volas averti, ke mi tre ŝatas la ĉiel aplaŭdindan laboron, kiun la kapabla S-ano Molera digne gvidas en niaj *Esperantaj Kursoj per Korespondado.* Se mi elpaŝas al la areno de nia BOLETIN, tion diktas nur plej sincera deziro eviti tuberojn al niaj komencantoj kaj neniel emo piki bravan samideanon kaj estimatan amikon. Laŭ mia lingvosento, *anstataŭ* rolas ĉiam kiel prepozicio, dum *kvazaŭ* funkcias ĉefe kiel konjuncio. *Kvazaŭ* povas ludi kiel adverbo; sed, en la kazoj prezentitaj de S-ano Molera, ĝi nepre estas konjunkcio. Kial? Jen:

1.— *Prepozicio* estas vorto, kiu ligas, ĉiam, *substantivan objekton* (infinitivo estas substantiva formo de verbo; tiel do ankaŭ substantiva objekto) al alia vorto, per oportuna dependa rilato. Ekzemple:

Rivaretoj fluas *al* riveroj.
Donu *al* mi pecon *de* tiu kuko.
Jen glaso plena *de* akvo.
Li pasis *preter* mi *sen* saluto.
Mi donis al vi la landon *por* posedaĵo.
Mi prenis plumon *por* skribi leteron.
Ne servas larmo *anstataŭ* armo.
Vi dormas *anstataŭ* labori.
Li batis Petron *anstataŭ* [bati] Paŭlon

2.—*Konjunkcio* estas vorto, kiu ligas vortojn, frazojn aŭ propoziciojn havantajn *saman gramatikan rolon.* Foje *konjunkcio* dependigas unu objekton de alia, sed tiukaze temas, ĉiam, pri *propozicioj;* kaj por nomi la konjunkcion, kiu rolas tian dependigan kunigon, oni proponis la neologismon *subjunkcio.* Jen ekzemploj:

KONJUNKCIOJ:

Patro *kaj* patrino estas gepatroj.
Ĉu vi trinkos teon *aŭ* kafon?
Lango miela *sed* koro kruela.
Pli bona pano sen butero *ol* kuko sen [libero.
Mi ne renkontis lin *nek* lian fraton.
La akuzativo montras direkton, *t. e.* [movadon al ia loko.

SUBJUNKCIOJ:

Mi sentas, *ke* la morto baldaŭ min vokos.
Se oni amas la gaston, oni zorgas la paston
Mi vidas nenion, *kvankam* ĉio estas luma.
La ĉielo aspektis, *kvazaŭ* ĝi estus balaita.
Kvazaŭ laŭ sorĉa frapo, ĉio mutiĝis.
Ni akceptis lin, *kvazaŭ* reĝon
(kiel oni akceptas reĝon).
Forĝu feron, *dum* ĝi estas varma.

Tiuj ekzemploj, prenitaj el *Plena Vortaro* kaj plejparte zamenhofaj, estas kristale klaraj komence de la kolonoj, ĉar tie ili estas ekstremaj. Sed ĉe la malsupro de la kolonoj --intence tion mi aranĝis--, la kazoj ne estas tiel netaj: «Mi prenis plumon por skribi leteron» estas propozicio, kies ideon oni povas ankaŭ esprimi per «Mi prenis plumon por skribo de letero»: Ĉe ambaŭ okazoj *por* ja rolas kiel prepozicio, kvankam oni iel sentas, ke *skribi,* en la unua propozicio, estas pli verbo ol substantivo, pro la akuzativo *leteron,* el kio sekvas, ke tie la vorto *por,* eĉ se prepozicio, agas kvazaŭ subjunkcio. Nu, *anstataŭ* ĝuste estas prepozicio, kiu, kiam ĝi dependigas verbojn, ludas kiel subordigilo, kiel *kvazaŭsubjunkcio,* ĉar tiam ĝi staras lime inter la roloj dependiga kaj subordiga, t. e. prepozicia kaj subjunkcia. Tiun duoblan funkcion, jam kun neta apartigo de ambaŭ roloj, oni povas vidi ĉe *dum.* Kiam ĉi tiu dependigas substantivon de alia vorto, ĝi rangas inter prepozicioj: «Fleksu arbon *dum* ĝia juneco»; sed kiam ĝi dependigas verbon, t. e. propozicion, tiam ĝi viciĝas inter subordigaj konjunkcioj aŭ subjunkcioj: «Forĝu feron, *dum* ĝi estas varma». Ambaŭ propoziciojn oni povas inversigi proksimume jene: «Fleksu arbon, dum ĝi estas juna» kaj «Forĝu feron dum ĝia varmeco», kio plene pravigas la teorion.

Kvazaŭ, jes ja, povas agi kiel adverbo, sed tiam oni povas facile anstataŭi ĝin --ĉe gramatika rezonado, kompreneble-- per alia adverbo, sen aliigo de la propozicio:
Ŝiaj okuloj *kvazaŭ* paroladis.
Ŝiaj okuloj *iamaniere* paroladis.
La ĉevaloj estis *kvazaŭ* pudritaj.
La ĉevaloj estis *laŭŝajne* pudritaj.

Ĉe la kazo proponita de S-ano Molera: «Li uzis ĉapelon *kvazaŭ* ĉapo(n)», la anstataŭo de *kvazaŭ* estas ebla --en gramatika ekzemplodona paradigmo-- nur per *kiel* (aŭ per aliaj proksimumaj samsenciloj: ***sammaniere al, ne alie ol, en tia maniero kia, samgrade ol, laŭŝajne kiel***, ktp), kiu ja estas *konjunkcio* por enkonduki komparon. Sed, kiel ĉe *por* --kaj pli ĉe *anstataŭ*--, je la limoj inter kunordigo kaj subordigo; *kvazaŭ* foje deĵoras ĝuste sur la transira punkto, do, jen konjunkcie jen subjunkcie. Kaj tiel, la vortoj ligitaj havas, aŭ ne, laŭ la kazoj, la saman gramatikan rolon.

Adverboj, subjunkcioj, konjunkcioj, prepozicioj formas ringon, kiu mordas sian voston. La historio de la hindoeŭropaj lingvoj montras, ke substantivoj, je certaj okazoj, fosiliiĝas, senmoviĝas en siaj fleksioj kaj iĝas adverboj kaj prepozicioj, kaj ke adverboj transiĝas en prepoziciojn, konjunkciojn, subjunkciojn. Esperanto, hindoeŭropa sintezo, bone respegulas tiun procezon, kiu klare videbliĝas en prepoziciaj, konjunkciaj kaj subjunkciaj frazoj, tre ofte uzataj, kiaj ekzemple: *dank' al* (prepozicio), *tio estas* = *t. e.* (konjunkcio), *eĉ se* (subjunkcio = *kvankam)*, k. t. p.

Infinitivo havas duoblan vizaĝon: ĝi estas verbo kaj ĝi estas substantivo; multfoje ĝi ludas ambaŭ rolojn, ekzemple ĉe «Mi prenis plumon por *skribi* leteron». Se oni rigardas al *por, skribi leteron* egalas al *skribo de letero*, kaj sekve *por* estas prepozicio; sed se oni rigardas al *leteron*, ĝi estas rekta komplemento de la verbo *skribi*, kaj do *por* havas kvazaŭsubjunkcian rolon. Limoj inter infinitivo kaj substantivo, kiam temas pri kazoj kiel la supra, estas tre malprecizaj, ĉar, kiel ĝenerale en ĉio, nur la ekstremoj estas nete diferencigitaj. Klarigo pri la procezo igus nin iri longan vojon, tra propozicioj, kiaj: «Mi serĉas papiliojn, kaj malavare mi rekompencos *la ilin sendontojn*», t. e. propozicioj kun akuzativoj, kiuj komplementas substantivojn. Ĝi estas interesa temo pri kuriozaĵo de la hindoeŭropaj lingvoj; kuriozaĵo, kiu cetere ne mankas en Esperanto, eĉ ĉe Zamenhof, kvankam ĉe li nur dum la unuaj tempoj de la lingvo. Esperebl, mi havos okazon alian fojon reveni al ĉi tiu malofta, sed koninda lingvo-punkto.

—

Mi finas. Por kelkaj, probable, mia artikolo estas sole ĵonglaĵoj per rebusoj el la gramatika subtilejo; por aliaj, eble, nur ĥaosigaj diskutoj pri nomoj, nomigo, sencoj --semantika sterilaĵo; la plimulto, tre verŝajne, pretere konstatos: ***grammatica sunt, non leguntur!*** (*) Kaj tamen...!

(*) Latinaĵo: Gramatikaj aferoj: tion oni ne legas!

DU FAKTOROJ.

Ke la esperanta movado plivastiĝas de tago al tago, estas afero konata de ĉiu duonsperta esperantisto. Sed, se vere ni amas Esperanton, ni ne rajtas sidi komforte sub la ombro de la laŭroj. Oni ne povas neglekti du faktorojn, car ili ambaŭ estas danĝeraj, kiel veneno, kontraŭ la esperantismo. Unu el tiuj faktoroj estas la apatio de plejmulto el la esperantistaro. Sen ĉi tiu apatio, Esperanto eble estus jam de longe venkinta ĉiujn obstaklojn, kiuj malakcelas kaj baras ĝiajn antaŭenirantajn paŝojn. Neniam oni sufiĉe insistas pri ĉi tiu tikla punkto! Ne sufiĉas lerni kelkajn gramatikajn regulojn kaj enparkerigi kvar aŭ kvin dekojn da radikoj, por fanfarone sin nomi esperantisto. Por esti vera esperantisto kaj ĝui ĉiujn avantaĝojn, kiujn posedas nia kara idealo, estas nepre necese, post profunda lernado de la lingvo, streĉe laboradi senlace pri kaj por la zamenhofaj idealoj. La alia faktoro koncernas la ĉiamajn malamikojn de ĉiuspeca progresado. Tuŝi ĉi tiun punkton estas afero iom delikata kaj tro longa por nun trakti ĝin; bonvole mi gardas gin por alia tago. **Antonio Criach - Sabadell**

Devizo por aŭtentika esperantisto:

Plene posedi la lingvon kaj plene subteni la vivon de sia landa organizo!

Esperanto estas lingvo por la tuta mondo, sed tiun lingvon devas poluri kaj zorge vivigi la esperantistoj mem, sub la necesa unueco, kiu nepre devas komenci en la kadro de la nacia asocio

INTER LA PROZO DE LA ESPERAN

... Kaj la momento venis de mia cigna kanto! Vere ja, la fantazio ne longe devas persisti, por ne riski la ĉarmon, kiu malpeze ĝin estigas. Altaj kasteloj kaj artaj palacoj, kvazaŭ reale kreitaj de la ĥimeroj el sonĝo, senbrue tuj renversiĝas ĉe la unua signo de l' vekiĝo... Nu, tial ke vekiĝo venas, en formo de nova jaro, mi adiaŭas al vi --ho, karaj geamikoj-- antaŭ ol definitive malaperi, lasante nur la subtilan materion de miaj daŭraj babiloj, kiuj celadis impresi agrable ĉe via koro kaj nesti varme ĉe via spirito; ĉar ankaŭ sonĝanto, post la sonĝo, ofte ŝatas gardi en ĉelojn de la memoro la mirindan fabelon, ke fakte li grimpis ĝis alta krenelo de turo de alta kastelo, aŭ ĝis arta balustrado de balkono de arta palaco, por gajni la dolĉan premion de brulanta kiso. ĉe lipoj de bela princino...

Baldaŭ mi iros renkonte al mistera nenio, por mem nenio fariĝi. Sed, la efluvoj de mia kvinjara surtera restado montriĝos ankoraŭ, per multaj kaj multaj tre etaj nuancoj, de aspektoj variaj, en la vibroj de ĉie pulsanta naturo. Jes, sciu min percepti en la susuro de foliaro, en la murmuro de la fontoj, en la triloj de la birdoj, en la mielon liveranta laboremo de l' abeloj, eĉ en la kristala fluto per kies sonoj sin aŭdigas dumnokte la modesta bufo... Cetere, oni ankaŭ min trovos, sur pli vasta amplekso, en la fasko da sunaj radioj, kiu fendas nubegojn el vatoj, por montri ŝiraĵon el pura lazuro, post milda pluvado. Kaj, fine, krom tio, jam en nia propra ŝatata medio, ne forgesu min en ĉiu bela frazo de bona artikolo, sub ajna titolo el niaj gazetoj, kiuj donis temon al miaj petoloj, ankoraŭ en ludo kun ĉiu gaja informo, ke plian ŝtupon Esperanto atingis survoje al nepra la venko.

Kvazaŭ komprenante tion, fidele gardante respekton kaj altan estimon al la bona eduko, la gazetaraj taĉmentoj, en luksa formacio, por la lasta fojo, antaŭ mi jene defilas:

AMERIKA ESPERANTISTO, kun griza kartonita kovrilo, montriĝas kiel speciala numero pri la Kongreso de EANA, okazinta en Nov-Jorko, la impona urbego, kie gaje flirtis la verdaj standardoj. Okaze de la soleno, oni vizitis la sidejon de la Unuiĝitaj Nacioj, kun afabla akcepto, fare de la Helpa Ĝenerala Sekretario. Pluraj bildoj agrabligas la aspekton de la tuta kajero. ESPERANTO REVIEW estas la oficiala organo de nove fondita Ligo por Norda Ameriko; viglaj samideanoj multe intencas labori por disvastigi nian aferon en la afereca Usono. Dank' al interkonsento kun «Heroldo», oni reproduktas fotografe du plenajn paĝojn, en kiuj hazarde troviĝas la raporto pri nia Kongreso en Bilbao. Al la kuraĝaj fervoruloj mi deziras plenan sukceson! Pompante tra la kontinento, BRAZILA ESPERANTISTO karese min salutas. Kiel decas al la organo de plej forta amerika asocio por nia lingvo, ĝi estas plena de vivo, al kiu ne mankas sano, fervoro, obstino kaj sindonemo. BOLETIM DE ESPERANTO, kiel aparta informilo de Belo Horizonte, konfirmas la famon de la brazila esperantismo. Preterpase, mi salutas la bultenon de la Urugvaja Societo, kiu sin preparas por la grava kunveno de U. N. E. S. K. O, en Montevideo. ARGENTINA ESPERANTISTO estas la suda apogilo, kiu, kune kun SUDA KRUCO, bulteno de Argentina Esperanto-Katolika Asocio, garantias bonan grundon por nia idealo. Kaj nun estas vico por Azio, respekteginda avino de la homaro. LA REVUO ORIENTA, kiel kutime, estas zorge prilaborita: klaraj bildoj, tre bone ordigitaj, estas kvazaŭ filmo pri la 40ª Japana Kongreso, plej brile okazinta en Okajama. Sekvas kelkaj aliaj japanaj titoloj: LA MOVADO, organo de diversaj grupoj. SAMIDEANO, kun bonaj literaturaj kaj soci-politikaj artikoloj. Vere kurioza estas ĝia sinsekva Elementa Kurso de Japana Lingvo; kaj, kiel broĉo, por tiu sociala serio, EL JAPANIO bone pravigas sian rolon de laŭtparolilo por la japanaj pacbatal-antoj. OOMOTO, kvankam religia gazeto, estas tre

NE FORLASU NIN!

Al...

LA magia kristal' de l' vortoj viaj
LEvas, kvazaŭ per vortoj de fein',
GElegantojn al sferoj sorĉaj, diaj,
MAgiisto de nia BOLETIN.
KOlorriĉa spirito poezia,
BOLkreanto de fraz' ĉarma sen fin'.
DEnove verku, por ke verko via
TOrentojn donu da plezur' al ni!

Alcibiades GONZALEZ MEANA
Ciaño - Santa Ana (Asturio)

Legita de la aŭtoro, en la Literatura Vespero de la 14ª Hispana Kongreso de Esperanto

...ISTA GAZETARO

ŝatata legaĵo por esperantisto, deziranta kompreni la kaŝitajn sencojn de la azia filozofio. En ĉi tiu mia lasta recenzo, mi ne volas silenti pri la tre bona gazeto. EL POPOLA ĈINIO, eldonata de ĉina oficiala eldonejo. Kompreneble, pri la enhavo de la artikoloj estos malsamaj opinioj, favoraj kaj malfavoraj, sed la aranĝo, la prezento kaj la lingvo ricevos nur laŭdojn de objektiva leganto. En la kovrilo de la numero, kiun mi rigardas, estas belega multkolora reprodukto de akvarelo, kiu per si mem estas pli elokventa reklamilo ol pasiaj pamfletoj de la interno. El pure tipografia vidpunkto, ĉi tiu gazeto estas modelo, eĉ sekvante sian difinitan direkton! Aŭstralio, la insulo-kontinento de la kanguruoj, sin prezentas per LA RONDO, ĉiam vigla kaj dinamika, ĉiam kun bona enhavo, el kiu oni povus represi multajn fragmentojn. Eŭropo, kun sia svarmo da nacioj, estas la haltejo de mia migrado. Mi adiaŭas al THE BRITISH ESPERANTIST la fidinda veterano, kiu ĉiam traktas niajn aferojn tiel serioze, kiel oportune kaj sperte. ESPERANTO EN SKOTLANDO estas iom pli ol simpla gazeto, ĝi estas amiko plezure akceptata en ĉiu samideana hejmo, kie oni ŝatas la belajn formojn kaj la belajn artojn, ĉar ne vane tiaj kvalitoj inde apartenas al la skota skolo. ESPERANTO la internacia revuo de U. E. A. ege akurata, kiel horloĝo, perfekte funkcias en sia rolo de centra informilo de la tuta neŭtrala movado. HEROLDO DE ESPERANTO, ĉiam moderna, ĉiam aktuala, «signifas por Esperantujo tion, kion la grandaj tagĵurnaloj signifas por la respektivaj landoj kaj urboj. kie ili aperas». Jes, tion diras reklamilo; kaj, certe, tio estas vero plej evidenta. LA PRAKTIKO, la gazeto de la mondpopolo, estas alia esperantista fieraĵo, kies ampleksaj raportoj kaj grandaj bildoj donas al ĝi kategorion de unuaranga revuo, ne malsupera al similaj nacilingvaj periodaĵoj. En la listo de centraj organoj ne devas manki la nomo de SENNACIULO, la organo de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu aroge svingas siajn principojn. Saluton al la simpatia studfolio LA PROGRESANTO, kiun emocie mi adiaŭas. ESPERO KATOLIKA sin turnas al siaj legantoj, en bela enkonduko por «la lasta monato de la jaro, dum kiu la komercistoj kaj fabrikantoj komencas prepari la bilancojn pri siaj aferoj kaj ni, kristanoj, pri la stato de nia animo». LA STUDENTO, internacia studenta gazeto, aperigas interesan artikolon «El mia studenta vivo» de pola samideano R. Sakowicz. La recenzejo estas zorge flegata; kvankam, bedaŭrinde, laŭ oficialaj komunikoj, ne mankas internaj kvereletoj.

Nu, jen ĉio! La brilkolora fadeno de nia interligo fine eliĝis de la bobeno. Adiaŭ, do! De nun mi ekzistos en via imago sole nur per rememoroj. Sed tiuj romantikaj reflektoj, el tempo jam forpasinta, iel similos al la ora polveto, kiun la tremantaj flugiloj de kaptita papilio postlasas inter la fingroj, ĉar plektita kun via vivo sopire restos la fantazia vivo de

LA LEGEMA KOBOLDETO



KARAJ GEAMIKOJ:

Se la redaktado de nia Bulteno, dum kvin plenaj jaroj, multe da zorgoj liveris al mi, ankoraŭ pli multe da ĝojo mi trandis, sciante vian bonan volon al mia laboro. Tial, en la momento lasi --kvankam ne forlasi!-- la honoran postenon ĉe alia kompetenta gvido, akceptu same bonvole la ateston de mia plej kora saluto

Luis Hernandez

LA BIBLIOTEKO NE NUR ESTAS LIBREJO, SED ANKAŬ TREZOREJO. - **Seneca**

RECEPTO POR FRANDEMULOJ

KUKETOJ DE LA MANCHA (hispana regiono)

Por 1380 gramoj da porka graso estas necesaj 1610 gramoj da blanka faruno, unu glaso da blanka vino kaj la suko de duono da oranĝo. Oni knedas unue la grason, poste oni aldonas la vinon kaj la oranĝan sukon; kaj, sekve, oni miksas la farunon iom post iom. Kiam, post daŭra prilaboro, fariĝas knedebla la pasto, oni tranĉas ĝin per muldilo, kaj oni ordigas la pecojn, kuirante ilin en forno. Post milda kuirado oni surverŝas ilin per pulvorigita sukero.

Manuela Gallardo Gómez (Madrido)

NOMENKLATURO DE LA JARCENTOJ

En la kristana erao, la jarcentoj ricevis laŭvice jenajn alnomojn:

La unua, de la Savo.
La dua, de la Sanktuloj.
La tria, de la Martiroj kaj Ermitoj.
La kvara, de la Doktoroj de la Eklezio.
La kvina, de la Barbaroj.
La sesa, de la Juro.
La sepa, de Mahometo.
La oka, de la Araboj.
La naŭa, de la Normandoj.
La deka, de la Malklereco.
La dekunua, de la Krucmilitiroj.
La dekdua, de la Religiaj Ordenoj.
La dektria, de la Turkoj.
La dekkvara, de la Artilerio.
La dekkvina, de la Presarto.
La deksesa, de la Beletristiko.
La deksepa, de la Konstruado.
La dekoka, de la Popolvekiĝo.
La deknaŭa, de la Lumo.
La dudeka, de la Konkero de l' Aero.

LA PLORO DE LA BESTOJ

En danĝero de morto, la cervo ploras eligante larmojn, same kiel la urso, eĉ en okazo de morto sen perforto. La ĝirafo ankaŭ ploras abunde, nur rigardante ŝirajon kun makuloj de sango en sia haŭto. La inteligenta elefanto elverŝas larmojn pro morala doloro, kiam ĝi troviĝas en kaptiteco, eĉ se oni karesas ĝin. Ĉi tiu pakidermo, kiel la foko, la delfeno kaj ceteraj bestoj kun kapablo plori, neniam emas al venĝo kontraŭ la homo, kaŭzanta al ili nenecese dolorojn kaj suferojn.



Tiu amo ne estas firma, kiu ne scias atendi. **Gabriel y Galán**

SFINKSA ANGULETO

ARITMETIKA DIALOGO

—Diru, paĉjo, kiom da jaroj vi havas?

—Atentu bone: Kiam mi havis vian nunan aĝon, mi devis atendi ankoraŭ 20 jarojn ĝis via naskiĝo; kaj, kiam vi havos tri kvaronojn de mia nuna aĝo, mi havos tiam duoble pli da jaroj ol vi.

Kiom da jaroj havas nun la patro?

La solvoj estos akceptataj ĝis 15. Januaro.

SOLVO DE LA PROBLEMO

LA KUNVENO

EN LA PASINTA NUMERO

100 viroj — 90 virinoj — 60 infanoj

Preferinde estas enamiĝi kiel frenezulo, ol kiel stultulo. — JUAN MAÑÉ

BONHUMORA PLUVETO

—Al mia patro plaĉos, ke vi estas poeto.

—Ĉu vere?

—Jes, ĉar mia antaŭa amindumanto estis boksisto...

—

—Ho! Kiel malagrabla afero! Miaj ŝtrumpetoj ĉiam estas difektitaj...

—Nu, edziĝu! Kiam mi estis fraŭlo, tio mem okazis al mi, sed mia edzino jam instruis al mi la manieron fliki ilin...

—

—Lastan fojon mi admonas vin! Lastan fojon!! Ĉu vi komprenas?

—Ho, jes; kaj mi estas tre kontenta, ĉar aŭdi admonojn ĉiutage ne estas agrable...

—

—Kial vi ploras tiel pro la morto de tiu milionulo, se eĉ parenco lia vi ne estas?

—Nu, ĝuste pro tio...

—

—Kial vi ne brodis la naztukojn laŭ la maniero, kiun mi indikis al vi?

—Jes, sinjorino, mi brodis viajn ĉefliterojn en la unua tuketo, sed en la aliaj, simple nur mi metis la mallongigon «ktp.»

✳ LA VIRINO ✳

Fama aŭtoro tiel difinas la virinojn, laŭ la aĝo: Dudekjare, ili estas misteraj, kiel Azio; tridekjare, ardaj, kiel Afriko; kvardekjare, plenmaturaj, kiel Ameriko; kvindekjare, malproksimaj aŭ apartaj, kiel Aŭstralio; kaj, sesdekjare, tiel melankoliaj kaj forgesitaj, kiel Eŭropo...

BELARTA KONKURSO 1954

Ni invitas la kvinan fojon niajn verkistojn kaj artistojn konkuri en la BELARTA KONKURSO. Internacia komisiono prijuĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj kaj la prezento de la gajnintaj verkoj okazos dum la 39ª Universala Kongreso en Haarlem. Samloke okazos la prezentado de la ĉefpremia dramo.

Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj ankaŭ monpremion. La du sekcioj estas:

I. LITERATURA SEKCIO

1. *Originala poezio.* Maksimume 108 versoj per 1 - 3 poemoj.
2. *Tradukita poezio.* Maksimume 108 versoj per 1 - 3 poemoj.
3. *Originala prozo.* Ĉiu prozaĵo maks. po proks. 12.000 literoj.
4. *Originala drameto.* Ludodaŭro, maksimume, 25 minutoj.

Oni rajtas partopreni per maksimume tri (antaŭe ne aperintaj en presa formo) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe la traduka branĉo, oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj laŭeble aperos en la gazeto «Esperanto» kaj antaŭe oni ne rajtas aperigi ilin en alia gazeto. Skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon kaj, sur aparta slipo, la pseŭdonimon kun via vera nomo kaj adreso, eventuale kun via kongresnumero aŭ kun membromarko de U. E. A. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Sendu ilin en kvin ekzempleroj; en la traduka branĉo aldonu ankaŭ 5 ekzemplerojn de la originalaj verkoj.

II. SEKCIO DE ARTO GRAFIKA KAJ PLASTIKA

1. *Desegno de Esperanta Afiŝo* en formato 45 x 65 cm. La desegno havu maksimume tri kolorojn. Sola teksto estu la vorto ESPERANTO kaj eventuale LINGVO INTERNACIA. Ie sur la bildo oni lasu spaco(j)n por surpreso de nacilingva informa teksto.

2. a) *1-3 ilustraĵoj* por Esperanta(j) verko(j) de prozo aŭ poezio.
   b) *Desegno aŭ kovrilo* de iu Esperanta verko, kun indiko pri la maniero de bindo aŭ brosuro. La bildoj en branĉo 2 (a kaj b) estu en dimensioj duoblaj al la presformato.

Ĉiu konkursanto rajtas partopreni per maks. 3 provoj en ĉiu ***branĉo*** (en 2/a maksimume, do, estas 9 bildoj). Subskribu viajn verkojn per pseŭdonimo; kaj sur aparta slipo, en la sama pakaĵo, notu la pseŭdonimon, vian efektivan nomon kun adreso kaj aldonu eventuale vian kongresnumeron aŭ U. E. A.-membromarkon. La bildoj restos propraĵoj de la aŭtoroj, kiuj ricevos ilin per rekomendita poŝto. Sendu ilin sammaniere.

ĜENERALAJ REGULOJ POR PARTOPRENO

1. Ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 39-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de U. E. A. (ĉu rekte, ĉu per «adopto»).
2. Sendu ĉion al la peranto S-ro *Ken Lawrence, 244 Quinton Road, Birmingham 17* (Anglujo). La peranto havas la devon konservi la anonimecon de la partopreno.
3. ***La limdato*** por la ricevo de la konkursaĵoj estas la ***31ª de Marto 1954,*** en la Literatura Sekcio, kaj la ***15ª de Junio de 1954,*** en la Grafika Sekcio.
4. ***Konkursa kotizo*** (sendepende, ĉu ***en unu sekcio*** oni sendas unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj) por britoj 1 ŝil. 6 p. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponojn, 3 respondkuponoj (maldekstre stampitaj) aŭ malpli laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas malpermesita, la partopreno estas senpaga.

D-ro F. SZILAGYI, Sekretario.

SVEDA SOMERA SEMAJNO 1954

La ĉi-jara prelegsemajno en Frostavallen (Svedujo) bone sukcesis, kaj la temaro «Internacia kulturinterŝanĝo» altiris grandan intereson, ne nur ĉe la partoprenantoj, sed ankaŭ ĉe la gazetaro kaj ĉe la UNESKO-konsilantaroj, kiuj ricevis informon pri la prelegoj. Ni daŭrigos la entreprenon en 1954, kiu jaro estos por ni tre grava. La prelegsemajno okazos 8 - 15 Aŭgusto 1954. Sekve, tuj post la Universala Kongreso en Haarlem. Frostavallen situas en la suda parto de la lando, kaj oni bone povas atingi la lokon, post la fino en Haarlem. Jam nun oni povas sin anonci al S-ro Jan Strönne, Amiralsgatan, 36, *Malmo* (Svedujo). La nombro de la partoprenantoj estas limigita. Informojn kaj detalojn pri la programo oni donos poste. Sveda Esperanto-Instituto aranĝos la prelegsemajnon. — *SVEDA SOMERA SEMAJNO.*

ANTOLOGIO DE BRAZILAJ RAKONTOJ. Elektitaj de la Brazila Beletristika Akademio, kun antaŭparolo de ĝia Prezidanto, S-ro Barbosa Lima Sobrinho. Eldono de Brazila Esperanto-Ligo: Praça da República, 54, 1.° - Rio de Janeiro (Brazilo). 311 paĝoj. Formato: 14 x 19 cm. Prezo: 80 pesetoj, akirebla ĉe Libro-Servo de Hispana-Federacio.

Daŭras en vico la rakontoj! Nun estas la ĉarma Brazilo, kiu prezentas al la tutmonda esperantistaro vivajn pecojn el la varia karaktero de sia popolo, kies pasia temperamento, sub influo de plej diversaj emocioj, montriĝas naivo nuda, en ĉi tiu kolekto, al la scivolaj okuloj de komprenema leganto. Trafa estas la reklama voko: 33 Aŭtoroj, 33 Rakontoj, 33 Tradukintoj! Jes ja: aŭtoroj plej elstaraj, rakontoj plej karakterizaj --speciale elektitaj por ni de la Brazila Beletristika Akademio mem-- kaj tradukoj bele prilaboritaj de plejado da samideanoj, kies konscio pri la grava tasko donis flugojn de supera vervo al ilia inspiro. Tial, la dika volumo estas riĉa albumo, kun energie desegnitaj trajtoj.

Legante kelkajn paĝojn, oni *vidas* la pejzaĝon, oni *sentas* la efikon de l' klimato kaj oni korskue *perceptas* la angoron de la tragedioj --ordinaraj homaj tragedioj-- kiuj tro insiste trudas sian rigoran signon en plimulto de la rakontitaj epizodoj. Jen la sola rimarko, kiun sincere mi faras, por la elektitaj temoj; ĉar, kvankam malfeliĉo kaj ĉagreno sidas ĉie, nenie ili absolute regas, tial ke la ĝojo kaj la vivo, persiste kaj daŭre, ankaŭ ĉie deĵoras por mildigi suferojn kaj forviŝi dolorojn. Kaj Brazilo, juna lando kaj sana popolo, al kiuj sopire turnas siajn okulojn milionoj da homoj, tra la ega vasteco de la tuta mondo, devas montri al tiuj avidaj rigardantoj ne nur la fatalon de l' pereo, en siaj densaj sovaĝejoj, nek la bagatelon de frivolaj plezuroj, en la luksaj kabaredoj de siaj grandaj ĉefurboj, sed la honestan ĝojon, kiun certe spertas multaj homoj, tie laborantaj por gajni sian panon, trovi sian amon kaj atendi trankvile la naturan fenomenon de la morto...

La supre diritaj kaj sincere faritaj rimarkoj koncernas nur la sencon, kiu, se ĝenerale pesimista, akiras tamen, eble pro tio, en ĉiu rakonto, belajn delikatajn formojn kun alta literatura valoro: la ĉarma fablo «Apologo»; la profunda filozofio de «La reveno de la Tri Reĝoj» kaj «La Vivo de la Homo»; la subtila studo pri la infana psikologio dum la tikla aĝo, kiam oni komencas rigardi la virinojn, kiel virinojn... kio estas ĉarme prezentata en la agrabla noveleto «Paĝo relegata». Krom tio, tra la tuta kolekto, abundas koncizaj sed impone plastikaj frazoj, kiel la jena: «La homamaso elfluadis el la pordoj, kvazaŭ densa oleo tra la fingroj de iu mano». La morala apogo de la Brazila Beletristika Akademio al la eldono de ĉi tiu Antologio estas afabla kaj dankinda gesto de tiel grava institucio, kies honorinda Prezidanto plivalorigas la libron per tre interesa antaŭparolo.

Pri la lingvo en la tradukoj estu dirite sen hezite, ke ĝenerale ĝi estas bona --en kelkaj periodoj eĉ bonega!-- kun granda unueco, kvankam la propra stilo de ĉiu prilaboranto montriĝas libere en esprimoj kaj nuancoj. El inter la 33 tradukintoj estas kelkaj samideaninoj, kiuj inde vicas inter la majstro Porto Carreiro Neto kaj la junulo Geraldo Mattos, pasante tra la zorge kulturita ĝardeno de la pioniroj Ismael G. Braga kaj Caetano Coutinho. Sed, la makuleto de pluraj gramatikaj eraroj, precipe en la apliko de prepozicioj, iomete difektas la aranĝon, almenaŭ en la absoluta perfekteco, kiun la verko meritas posedi. Apud *saŭdado,* sufiĉe oportuna, ĉar temas pri portugallingvaj originaloj, troviĝas aliaj neologismoj tute superfluaj. Cetere *konstitucio* ne estas *strukturo,* nek *tombigi* estas *faligi.* En alia rakonto troviĝas la formoj: Sankta *Tereza* kaj Sankta *Ritino.* La aspekto de la libro estas plaĉa pro bonkvalita papero kaj klara preso. Sed, tial ke temas pri antologio, kial ne montri la titolon de ĉiu rakonto, ĉe la supro de la koncernaj paĝoj? Tio estus oportuna.

Bibliografio kompletigas la volumon, helpante koni iom detale ĉiujn aŭtorojn el kies verkaro oni elektis specimenon por nia distro kaj ankaŭ por nia instruo.

LUIS HERNANDEZ

NIA LINGVO ESPERANTO de Karl Vanselow. Eldonis «Bruck und Verlagshaus Wilhem Limpert» Berlin S. W. 68 (Germanio)

Daŭrigante tiun elektitan poezion por belsona deklamo, plejparte kantebla, laŭ famaj melodioj, aperis jam la unua kajero de la dua Ardesia-eldono. La tri libretoj de la dua serio, kun la tekstoj 126 ĝis 250, aperos en la nova jaro, kies antaŭpaga kosto estos entute 4 respondkuponoj (post la apero 5), cetere, ĉiu libreto estas unuope aĉetebla por 2 int. respondk. ĉe la aŭtoro Winterfeldstrasse, 27 - Berlin W 35 (Germanio)

ERNESTO HURTADO

LA ARTO FARIĜI CENTJARA. Maniero resti juna longtempe, de D-ro Ludwig Wegener. Eldonejo: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg (Germanio). Esperanto-Fako 1953. Kovrilo-desegnaĵo de Heinz Schneider Heubach. 60 paĝoj. Formato: 12 x 18'5 cm.

En ĉi tiu interesa verketo, la aŭtoro traktas klare kaj koncize pri unu el la plej gravaj problemoj de nia epoko, nome: la nutrado, kiu, bedaŭrinde, estas sufiĉe malzorgata de nia socio. Sekvante tiel nekompreneblan konduton, la nunaj generacioj riskas plej evidente sian ekziston.

La solvo, kiun prezentas la germana kuracisto, ne estas --kiel eble maliculo povas supozi-- la greftado de bestaj glandoj en la homan organismon, aŭ la apliko de nova kaj mirakla eliksiro. Tute neniel! Ambaŭ sciencaj metodoj malsukcesis. La programo estas alia: «Modera vegetara manĝado, sufiĉe da laboro, necesa ripozo, abunda movado, multe da akvo, suno, aero, *saŭno*, k.t.p. krom spirita laboro kaj interna trankvileco». Unuvorte: praktiki la naturajn rimedojn por konservi la sanon, sekvante regule la veran vojon.

Rilate la aplikon de *saŭno* (varmoprodukta aparato) mi rimarkigas, ke D-ro V. Ferrandiz perfektigis ĝin. Per tiu moderna aparato, nomata «Vigorsauna», nia organismo estas saturita de pura oksigeno. D-ro Wegener insistas emfaze pri la graveco de la nutrado. Certe, li plene pravas, ĉar ju pli simpla kaj natura estas la nutraĵo ricevita, des pli bela kaj harmonia rezultas la propra vivo. Oni ne forgesu, ke multe gravas konstrui bonajn fundamentojn. La aŭtoro ankaŭ rekomendas daŭran intelekton laboron, kun la celo plivigligi nian spiriton. Li donas etikan ekzemplon, dirante: «Mi havis pli ol sesdek jaroj, kiam mi komencis lerni Esperanton!» Ĉu vi volas esprimon pli elokventan? Nu, fine jam, varme mi rekomendas al vi, kara leganto ĉi tiun mirindan libreton. Ĝia filozofia kaj scienca enhavo nutros vian personecon per altaj pensoj kaj valoraj principoj, unumura maniero efektivigi per naturaj rimedoj la sinceran deziron de l' aŭtoro, t. e. fariĝi centjara!

LA DIA VOJO de H. Hubertsson. Evangelia serio de Sveda Societo «Esperanto-Missionen». Kajero 5. Adreso: Klackvägen, Nora Stad (Svedio). Prezo: 2 internaciaj respondkuponoj.

Temas pri nova kajero por dissemi la kristanan kredon pere de Esperanto. Ĝi enhavas aron da religiaj normoj, celantaj konduki la homojn al la Dia Vojo, al daŭra paco kaj al superabunda ĝojo pro ŝaviĝo.

KIAL MONDREGISTARO? Manifesto de la Mondfederalista Grupo de Britaj Parlamentanoj. Havebla ĉe «Universala Ligo»: Riouwstraat, 172, Den Haag (Nederlando). Prezo: unu respondkupono aŭ unu U. L.-Stelo.

Jen mi prezentas hodiaŭ al la konsidero de ĉiu leganto la suprecititan dokumenton, kies alloga enhavo ne povas ne interesi. Oportune, do, estas mencii ĉefajn punktojn el la temaro: «La esenco de la paco --La mondo bezonas registaron-- La ekonomiaj sekvoj-- La U. N. O. ne estas sufiĉa --Reformo de la U. N. O. --Sukcesa aplikado de la leĝo-- La politika problemo --Mondskala reciproka helpo --Ĉu Mondregistaro estas ebla? --La mondo ŝanĝiĝis».

Ĉiuepoke, la homoj klopodis por mondpaco. Sed, preskaŭ ĉiam, ili forgesis gravan faktoron, kiu devas ludi la ĉefan rolon; nome: Plena sincereco kaj bonvolo. Sen tiuj ingrediencoj, ĉiuj projektoj aŭ diskutoj nepre fiaskos. Nu, ĉu fine la homaro havas nun favoran ŝancon por vera solvo?

RELIGIA VIVO. Kajero núm. 6 de A. Alamo-Sandgren. — Klackvägen, Nora Stad (Svedio). Prezo: 2 internaciaj respondkuponoj.

Plia interesa broŝureto, en kiu oni priskribas skize, sed klare, la religian movadon en Svedio, laŭ radio-prelego, dum Januaro 1950. de la aŭtorino mem.

JAIME ARAGAY (Barcelono)

FAKTOJ PRI NORVEGUJO. 64 paĝoj, 12'5 x 17. Eldonita de Chr. Schibsteds Forlag, Oslo. Prezo: 3'50 norv. kr. plus sendkostoj Aĉetebla ĉe Eldonejo Esperanto A S, Box 942, Oslo (Norvegujo)

Jen tre interesa libreto, ĝemela frato de tiu titolita «Faktoj pri Danlando». Ĝi estas Esperanta eldono de oficiala informbroŝuro, pri la norvega lando, aperinta jam en pluraj lingvoj. Eldonita de Chr. Schibsteds Forlag kaj la plej granda norvega taggazeto «Aftenposten», en kunlaboro kun Norvega Esperantista Ligo, ĝi ricevis subvencion de la norvega departemento por la ekstero. Koncize, sed abunde, la libreto donas konkretajn kaj objektivajn informojn pri la bela lando de la fjordoj, kiu certe interesos al ĉiuj esperantistoj. La nomo de la tradukinto, S-ro H, A. Rosbach, konata aŭtoro de «Bagatelaro», estas bona garantio pri lingvoperfekteco. Miaopinie, estus tre interese eldoni similajn libretojn pri aliaj landoj, kiuj kon-istigus belan kolekton.

J. JUAN FORNÉ.

Pro memvola eksiĝo de la ĝisnuna redaktoro Luis Hernandez, ekde la venonta numero zorgos pri la redaktado la kompetenta samideano, el la Valencia rondo, Juan Bosch.

ESPERANTISTA VIVO

En la hejmo de S-ro J. L. Muñoyerro, la vigla sekretario de la Kongreso en Bilbao, la feliĉo estas kompleta pro naskiĝo de dua ĉarma fileto Paul. Nia kara amiko ĝojas sciigi la agrablan novaĵon, same kiel ni ĝojas gratulante lin kaj lian simpatian edzinon.

...Kaj ankaŭ la Prezidinto de la Organiza Komitato, S-ro Fernando Bayo, ĝojas kun sia edzino pro naskiĝo de ilia dua fileto Ignacio, kiu jam salutas la hispanan esperantistaron. Ĉu ne vere gratulinde?

Mortis nia samideano kaj federaciano S-ro Manuel Gil, malnova esperantisto, fondinto de la grava iama societo NOVA SENTO *en Barcelono. Ni esprimas nian kondolencon al lia edzino kaj filo —ankaŭ esperantisto— kiu, certe, je memoro al sia patro, laboros duoble kuraĝe en niaj vicoj.*

Je alta 83-jara aĝo, forpasis nia fervora samideano Francisko Menéndez Rua en Gijon (Asturio). Li estis malnova esperantisto kaj pioniro en sia regiono, jam fondinto en 1909 de la iama Reĝa Asturia Esperanto-Asocio; lastatempe ankoraŭ li aktive partoprenis en la reorganizado de la tiea movado. Pace ripozu!

RADIO ROMA

La interesaj elsendoj en Esperanto de tiu stacio okazas nun laŭ jena aranĝo:

Merkrede kaj Vendrede de 18'50 ĝis 19'10 laŭ mezeŭropa horo, per mallongaj ondoj je 31, 35 kaj 49'92 metroj.

Bonvolu aŭskulti kaj skribi al

RADIO ROMA (Esperanto - Fako)
Via V. Veneto, 56 — ROMA (Italio)

Prosperon kaj sanon en la Nova Jaro 1954ª
deziras al ĉiuj siaj estimataj geamikoj
Izak kaj Alida Schoon - Harry kaj Henny Van Zijl
OOIEVAARSTRAAT, 9
HAARLEM - N (Nederlando)

ANONCETOJ

Deziras koresp. per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj kun ĉiuj landoj
Enrique Albareda - Str. Gral. Franco, 8 - 1.° cto.
INCHAURRONDO - ALZA (San Sebastián)

Mi interesiĝas pri Esperantaj propagandmarkoj kaj stampiloj. Skribu al
S-ro Evaristo Gil
Str. Calders, 9, 3.° — BARCELONO

Ĉiuj samideanoj, serĉantaj nordamerikajn korespondantojn, skribu rekte al «Nordamerika Koresponda Servo»
9079 Madison Avenue LA MESA (Cal. U. S. A.)

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a DICIEMBRE 1953)

Suma anterior	5.275	Ptas.
J. Fernández - Oviedo	50	»
R. Barrufet - Barcelona	40	»
F. Bayo - Bilbao	15	»
R. M. - R.	100	»
Esperanto-Grupo - Moyá	57	»
J. Bosch - Valencia	25	»
V. Santamaría - Valencia	25	»
E. Hurtado - Valencia	15	»
F. Marco - Valencia	10	»
R. Calvet - Valencia	15	»
R. Quiles - Valencia	10	»
F. Poveda - Valencia	15	»
F. Boscá - Valencia	10	»
A. Pont - Valencia	10	»
J. Pérez T. - Valencia	10	»
A. Hervás - Benicalap	5	»
J. Devís - Valencia	10	»
M. Peris - Catarroja	10	»
L. Hernández - Valencia	43	»
Total general	5.750	»

Aún siendo inferior al del año pasado, este total es muy satisfactorio. ¡Adelante, pues!

FERIS-GRAN VIA M. TURIA, 28-VALENCIA